# LIGILO

n-ro 3 Aprilo 1987

eldonkvanto: 5,700 ekzempleroj

redaktas : BEL-estraro

## "OTN" bedaŭrinde...

Ĉiuj scias, ke la tiel nomata "PLANO CRUZADO" ne tute sukcesas. Sekve de tio, entreprenoj kaj organizaĵoj, por defendi sin kontraŭ la inflacio, ekuzas revalorigeblan valuton, t.e., "OTN" (Obrigações do Tesouro Nacional). Brazila Esperanto Ligo taksis je Cz$ 300,00 la jarkotizon por 1987, kiu valoris, en januaro, ĉirkaŭ 2,82 "OTN". En marto, 2,82 "OTN" valoris Cz$ 512,14. Tio signifas, ke ĝis marto, la ĉi-jara kotizo malgrandiĝis je 58,58%.

Krome, la abonoj al fremdaj eldonaĵoj aŭ aliĝoj al UEA nun postulas pli da kruzadoj ol kiam ni komencis la koncernajn varbadojn.

En la fino de la pasinta jaro, kiam ni decidis pri prezoj kaj valoroj, kaj ilin publikigis, neniu kapablis antaŭvidi la nunan nacian financan situacion.

Ni estas certaj, ke ĉiuj komprenas la problemon, kaj volas helpi BEL. Tial, ni atentigas vin pri la prezoj informitaj pere de ĉi tiu bulteno, kiuj aperas laŭ la "OTN"-formo.

Por sendi monon laŭ "OTN"-formo, vi devas unue konsulti bankon, ĵurnalon aŭ revuon, kiuj indikas kiom da kruzadoj valoras la plej ĝisdata "OTN".

Kalkulante je via kompreno, la estraro de BEL antaŭdankas, kaj reliefigas, ke BEL-kotizo, malgraŭ la supra konsidero, daŭras je la sama valoro de Cz$ 300,00.

$ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $

## Nia grandioza UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO - UEA

Tiu kvaretaĝa solida domo, ĉe strato Nieuwe Binnenweg, meze de grava eŭropa urbo, Roterdamo, iamaniere respegulas la fortostreĉon de multaj generacioj, kaj miloj da esperantistoj, kiuj subtenadis, subtenadas kaj subtenados ĝin konstante kaj fidele. Inter tiuj homoj, dekoj estis aŭ estas famaj, socie, intelekte kaj individue elstaraj. La plimulto, sindediĉaj anonimuloj, ne malpli gravaj, certe, sed simplaj kaj fidoplenaj personoj,kiuj kredas, konscias, kaj helpadas.

Fondita en 1908, UEA, 79-jara, montras al la mondo kio ĝi estas:

- entrepreno profesinivela, multnacia - en la plej pozitiva senco;
- nur en ĝia Centra Oficejo laboras pagite, kaj kutime dum pli ol 8 horoj tage, deko da diverslandaj esperantistoj;
- ĝi havas preskaŭ 40.000 mil membrojn;
- ĝi havas propran grafikan centron - GCA - en Antverpeno, Belgio;
- ĝi havas oficejon specialan por rilati kun Unuiĝintaj Nacioj, en Novjorko;
- ĝi eldonas monate la revuon Esperanto, legata en 105 landoj;
- ĝi havas la plej kompletan librovendejon en Esperantujo, kun pli ol 2.700 titoloj;
- ĝi organizas ĉiujare universalan kongreson, kiu, krome la kultura kaj sociologia valoroj, estas finance interesa por ĝi;
- ĝi havas kapitalon, domojn, investojn;
- ĝi havas 9-personan estraron, el 8 landoj, kiu kunsidas du, tri fojojn jare, kies vojaĝ-, hotel-kostojn pagas UEA;
- Tutmonda Esperantista Junulara Organizo - TEJO, estas grava parto de UEA;
- ĝi reprezentiĝas en preskaŭ ĉiu loko de la mondo: riĉa kaj malriĉa lando, evoluinta kaj evoluanta lando;
- ĝi akceptas monon intereze;
- krome, ĝi ampleksas, ankoraŭ, la plej variajn agadkampojn !

Tia forto, homa kaj financa, ebligas, ke UEA fiksu apartajn kotizojn por sia membraro tra la mondo. Tiel, ke, riĉa lando pagu pli altan kotizon, kaj evoluanta lando, malpli altan. Ekzemple, UEA fiksis por Brazilo, ĉi-jare, kategorio MA, 40 guldenojn; por Nederlando kaj Usono, 70 guldenojn; kaj por Japanio, 75 guldenojn. Jen principo saĝa kaj frateca ! Feliĉe por Esperanto, kaj por ni esperantistoj, ke UEA ne estas identa al ĉiu kapitalisma entrepreno. →

→ Tamen, miru kaj gapu, sed UEA, sen la financa subteno de ĝia membraro, bankrotus.

Revenante iomete al ni - BRAZILO -, nia landa Esperanto-organizaĵo fiksis jaran kotizon de Cz$ 300,00 (proksimume 28 gld). Kaj, el nia membraro, kiu ankoraŭ ne atingas mil individuojn, venas 90% de niaj financaj rimedoj. Necesas kompreni, ke nia Plano Kruzado ne maskas nian realan inflacion de 15%, 18%, monate !, kaj ke, inflacio en industria lando, foje estas modestaj 2%, 8%, jare. BEL havas unuĉambran sidejon, kaj tro da investoj por konkretigi pere de maltro da mono, kaj ĝi havas estraranojn kaj kunlaborantojn kiuj laboras pli ol 8 horojn tage, en sia vivtena ofico, por doni aliajn pliajn horojn volontule al ĝi.

Same kiel UEA, BEL bezonas multajn esperantistojn kiuj pagas akurate sian aliĝon, konsciante, ke, sen tiu konkreta apogo, nia 80-jara landa organizaĵo pluvivos, sendube, sed nur de tradicio kaj rememoroj, ne de atingoj, modernigo kaj evoluo.

Fine, la pasintjara kotizo de BEL estis kvazaŭ almozpeto, nun, ni, brazilanoj, ekkomencas pagi malgrandan helpon. Cetere, akrevida rigardo tra UEA kaj BEL, indikas, ke ne tro inteligentas kompari la forton de Goljat kun tiu de David, malgraŭ ke, David povas multon fari...

---

Kongreso nacia en Rio de Janeiro

23-a Brazila Kongreso de Esperanto

La loka organiza komitato laboras por aranĝi ĉion koncerne al la kongreso.

Periodo: 13-19/07/1987

Temo :

Aliĝoj :

kategorio 1 - esperantisto kun pli ol 21 jaroj - Cz$ 375,00
kategorio 2 - akompananta familiano .......... - Cz$ 150,00
kategorio 3 - junul(in)o ĝis 21 jaroj ........ - Cz$ 150,00
kategorio 4 - infanoj ĝis 10 jaroj ........... - senpage

Post la 31-a de marto aldoniĝis 50% al ĉiuj kategorioj.
Bonvolu sendi vian aliĝilon kaj pagon REKTE al la kasisto:

FLÁVIO DE SOUZA PEREIRA
Caixa Postal 840 (20001 - Rio de Janeiro - RJ)

REFORMO en la statuto

BEL-estraro KUNVOKAS la konsilantojn kaj prezidantojn de aliĝintaj asocioj, INVITAS reprezentantojn de aliaj Esperanto-organizaĵoj, kaj BONVENIGAS unuopajn interesitajn esperantistojn, por partopreni en kunsido oficiala, kadre de nia 23-a Brazila Kongreso de Esperanto, kiu celos kolekti ideojn/proponojn SKRIBITAJN, por liveri stud-materialon al la Supera Konsilantaro, kiu respondecas pri ŝanĝoj en nia nune valida statuto - laŭ artikolo 24, ero f.

ATENTU: tiu kunsido ne estos voĉdona nek aproba, sed nur LABORA.

KORESPONDA KURSO

La komisiono kiu respondecas pri ellaboro de novaj korespondaj kursoj de BEL, donis al ni manuskripton de kompleta baza kurso, kiu konsistas el 30 lecionoj. Nun koncernas la administracion publikigi ĝin por vasta uzado.
Al la komisiitoj, kiuj devos plenumi aliajn taskojn, niajn dankojn !:

- ELVIRA FONTES, el São Paulo;
- GERALDO MATTOS, el Curitiba;
- MARCUS TÚLIO DE ALMEIDA FLORES, el Belo Horizonte;
- PAULO AMORIM CARDOSO, el Fortaleza.

Nekrologo

JOÃO ANDRADE (28 majo 1906 - 09 januaro 1987)

Forpasis, la 9-an de januaro 1987, en la urbo Volta Redonda-RJ, nia samideano João Andrade. Li estis posedanto de "Ótica Esperanto", vendejo kies nomo, dum 30 jaroj, vekis la atenton de la publiko pri la internacia lingvo. Multjare membro de Brazila Esperanto-Ligo kaj de Universala Esperanto-Asocio, li, krome, estis kunfondinto de Volta Redonda Esperanto-Klubo.

***

La vojaĝagentejo, kiun BEL kontaktis por aranĝi nian karavanon al Varsovio, nomiĝas BURITI TURISMO, el Brasília. Ĝi sendis rekte al BEL-anoj informilon pri kondiĉoj, programo, prezoj, k.s.
Reagoj flanke de la esperantistoj ne estis multaj, kio ŝuldiĝas, certe, al nia landa malfavora financa politiko: nia Plano KRUZ-ado !...

Adreso de Esperanto-Kursoj - ni petas al ĉiuj kursgvidantoj de Esperanto la komplezon sendi al Ligo la adreson de kursoj OKAZANTAJ ĉi-semestron, kun informoj pri nombro de partoprenantoj, por ke ni preparu statistikon pri kursoj tra la lando, kaj por sendi al ili informan materialon.

VOLONTULA SERVO DE BEL

Kie ajn estas Zamenhof hodiaŭ, li certe celebrus la Centjaron de Esperanto... laborante. Kaj do, sekvante liajn paŝojn, BEL kreis la VOLONTULAN SERVON por laborigi la esperantistaron. Temas pri laboroj rilataj al Libroservo. La taskoj estos plenumitaj en la propra urbo de la volontuloj. Komence, povas kandidatiĝi nur la asociaj membroj de Ligo. Interesitoj bonvolu sendi apartan informpeton al nia adreso.

LIBROSERVO libroservo LIBROSERVO libroservo LIBROSERVO

Ni preparas novan kaj kompletan librokatalogon, en kiu aperos varia kaj interesa esperantaĵo !
La respondeculo pri nia libroservo deĵoras ĉiutage en la sidejo, kaj li klopodas por tuj sendi vian mendon kaj ĝisdatigi tiurilatajn leterojn.
Atendu novaĵojn baldaŭe !

Rimarko

Por sendi valoraĵojn al BEL, vi povas uzi ĉekon aŭ poŝtmandaton je la nomo de: LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO.
Bonvolu ĉiam klarigi se temas pri aliĝo, abono de revuoj, aĉeto de libroj, donaco, ktp.

DE "SEN NOMO" AL "LIGILO" !

Inter dekoj da sugestoj, ni unanime elektis por nia informa bulteno la nomon: LIGILO , laŭ propono de Carlos P. Castanho, el São PAULO. LIGILO do estu ilo de LIGO kaj, ke ĝi ligu nin pere de reciproka kunlaboro kaj respondeco.

---

BRAZILA ESPERANTISTO

Tiel statas la evoluo de nia re-publikigota revuo:
-Itacir Luchtemberg finpretigis ĝian projekton; la estraro esploras presprezojn en diversaj urboj kaj jam konstatis ke ĝi alt kostos; ni bonvenigas reklamojn de esperantistoj kaj komercaj firmaoj.

---

Paraná Esperanto-Asocio publikigis lastfoje sian INFORMILON, dec. 86, cele apogi la novan formon de nia Brazila Esperantisto, kiu akceptos kontribuaĵon de E-o asocioj kaj de unuopuloj.

---

GRUPETO de brazilanoj planas partopreni en la 47-a Argentina Kongreso de Esperanto, okazonta en Rosario, 9-12/10/87. Al Esperanto -organizaĵoj ni sendas aliĝilon por tiu evento. Interesitoj pri aliĝo kaj kunvojaĝo kontaktu nin!
Temo de la kongreso: ESPERANTO EN LATINAMERIKO:

---

O QUE É O ESPERANTO

Vi jam povas mendi ĉe la Libroservo de BEL la libron "O que é o Esperanto", de Izabel Cristina O. Santiago. Esdonis ĝin Ed.Brasiliense, kiel ero de la famkonata serio "Primeiros passos". Prezo: Cz$40,00.

---

BRAZILA ESPERANTO-LIGO
SCS Ed. Jockey Club, sala 103, (70300 Brasília - DF)
Caixa Postal 11-1105 ( 70084 Brasília - DF )

ATENTU: Ĉiu bonvolu aktualigi la poŝtkodon de sia adreso!

ooooooo